

La Hispana kongreso malfermiĝis por la reta mondo

La ĉefajn okazaĵojn de la Hispana E-Kongreso eblis partopreni ne nur ĉeeste, sed ankaŭ per la reto. Interalie estis rekte elsendita debato inter Jorge Camacho kaj Renato Corsetti pri la temo „lingvo kaj movado“, kaj la spektantoj povis partopreni la diskuton pere de reta babilejo kaj sociaj retoj kiel Twitter. La iniciato estis parte inspirita de freŝa diskuto pri la estonteco de la Universalaj Kongresoj, okazinta en retlisto de UEA, rakontis Toño del Barrio. Laŭ li, la eblo rete partopreni neniel malutilas al la surloka sukceso de kongresoj, prefere male: „Reta elsendo ebligis partoprenon al homoj fizike malproksimaj, sed ĉefe ĝi instigu emon al fizika ĉeesto en estontaj kongresoj.“

(www.liberafolio.org)

Nova terminaro pri Ekoturismo

Akademio de Esperanto liveris raporton pri „Vortareto pri Ekoturismo“ pro la peto de Petr Chrdle (KAVA-PECH) kontroli la lingvaĵon en libromanusripto kun la titolo „Ekoturisma vortareto: Esperanta ĉeĥa germana angla franca“ verkita de Zdeněk Pluhař, Manfred Westermayer, Christopher Fettes kaj Raymond Skilling. Ĝi enhavas 592 terminojn en Esperanto kun tradukoj en la 4 aliajn lingvojn. (www.akademio-de-esperanto.org/verkoj/faka_lingvo_raporto20110415.pdf)

La septembra „longa nokto de la lingvoj“ en Vieno

Okaze de tiu aranĝo de diversaj kulturaj instancoj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko proponas senkoston gvidadon tra la muzeo kaj mallongajn t.n. fulm-kursojn. Popolaj altlernejoj prezentas informojn pri diversaj lingvoj, same la centra urba

biblioteko; eĉ „Sprachen-Bim“ (lingvotramo) veturas tra Vieno kaj interesitoj povas senpage kunveturi kaj konatiĝi kun diversaj lingvoj.

(www.onb.ac.at)

La 100-a bildo ĉe bildetejo.net

Dum la lastaj monatoj aperis jam 47 bildstrioj kaj 53 humurbildoj ĉe bildetejo.net. Tio signifas, ke nun sume 100 Esperantaj bildoj videblas. Sed ne nur „videblas“, ankaŭ ili haveblas laŭ permesilo de Krea Komunaĵo. La lanĉanto de tiu humor-retejo anoncas, ke pli da bildoj sekvos ĉi tiujn unuajn 100.

(www.bildetejo.net/)

Blogo „Mojose“ kun nova adreso

Jen blogo pri ideoj kaj produktoj en la krucvojo inter arto, fasonado, kulturo kaj teknologio. Publikigita ekde Junio 2008 kiel persona katalogo kaj referenca ilo, ĝi celas atingi kelkajn milojn da legantoj el ĉiuj partoj de la mondo pere de Esperanto. „Mojose“ nun havas novan adreson: www.facebook.com/esperantomojose

UEA ricevis tri novajn Honorajn Membrojn

En sia kunsido en Kopenhago la Komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA) elektis tri elstarajn movadanojn Honoraj Membroj de UEA. Ili estas d-ro Detlev Blanke el Germanio, d-ro Renato Corsetti el Italio kaj s-ro Rob Moerbeek el Nederlando.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Artikolo pri Esperanto en la faggazeto „Kriminalpolizei“

En la Aŭstria faggazeto de kriminala polico (4-5/2011) aperis dupaĝa raporto pri Esperanto kaj polico. Traktata estas la historio, la celo kaj la nuna situacio de la Internacia Lingvo, ankaŭ legeblas pri la devizo „Servo per amikeco“ en la IPA-insigno. („aŭstraj esperantistoj“)

EU-dokumento kun mencioj pri Esperanto

En Bruselo, ĉe la Eŭropa Unio (EU), en julio 2011 aperis grava raportdokumento pri multlingveco ene de la EU. Danke al la tre aktiva kunlaboro de pluraj esperantistaj lingvistoj kaj fakuloj sub la gvido de Seán Ó Riain, Esperanto kaj ties pozitiva rolo en la lernado de aliaj lingvoj ricevis lingvopolitike gravan agnoskon ĉe la EU. La rekomenddokumento „Politikaj Rekomendoj por la Antaŭenigo de Multlingveco en la Eŭropa Unio“ estas detala raporto (140 paĝoj), kiun kune verkis 29 tut-eŭropaj organizaĵoj kaj kiu plurloke parolas pozitive pri ebla rolo por Esperanto por antaŭenigi multlingvecon. La raporto ĝenerale substrekas la egalrajtecon de lingvaj komunumoj, grandaj aŭ malgrandaj, kaj konsideras ke la dominado de iu ajn nacia lingvo, kiel la angla, havas negativajn sekvojn por aliaj lingvoj kaj ties parolantoj. La reprezentantoj de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) en la forumo estis Seán Ó Riain, Jozef Reinwart kaj Maja Tišljar.

(www.edukado.net)

ILEI-konferenco 2011

„Lingva politiko kaj lingvaj rajtoj en edukado kaj scienca komunikado“ estis la temo de la 44-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en la Universitato de Kopenhago. Al la konferenco kaj simpozio aliĝis pli ol 90 personoj (i.a. el Brazilo, Meksikio, Kubo, Benino, Ganao, Indonezio, Nepalo, Japanio, Korea Respubliko kaj Ĉinio), temis pri la plej granda konferenco de la lastaj 20 jaroj. (Stefan MacGill)

Novaj gastejoj en la Esperanto-urbo Herzberg

Esperantisto el Vieno, Seyed Abolhassan Mir Javadi (voknomo AMIR), iama posedanto de Esperanto-Paradizo, aĉetis la malnovan hotelon

Goldener Hirsch kaj translokiĝis al Herzberg (Esperanto-Paradizo (1992-2006) estis vendejo kaj bufedejo en la riverbanejo Kritzenhof apud Danubo). Li komencis renovigadi la konstruaĵon. En la Herzberga ĉefstrato estis malfermita Esperanto-kafejo en la korto de la domo de lokaj entreprenistoj gesinjoroj Schicke. Ili uzas menukarton kaj varbŝildon sur la dommuro en Esperanto.

(www.esperanto-urbo.de)

Esperanto je la tria loko en Tatoeba

Esperanto, post la angla kaj japana lingvoj, ekde septembro 2010 staras sur la tria loko en tiu japana retejo, kiu disponigas frazaron por kompreni vortojn en natura ĉirkaŭaĵo kaj enhavas 1.000.000 frazojn, el kiuj 94.107 estas en Esperanto.

(Laŭ Lu Wunsch-Rolshoven)
(www.tatoeba.org)

Tutamerika Kongreso de Esperanto

Kune kun Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE) okazis la 1-a internacia Esperanta Kinofestivalo, baptita „Kino sen Limoj“ kaj ankaŭ la Brazila Kongreso de Esperanto kaj Brazila Esperantista Junulara Kongreso. KER-ekzamenoj sesio sukcese okazis en Brazilo dum TAKE. Brazilanoj amase partoprenis en ekzamenoj kaj sekve Brazilo fariĝis la lando kun la plej multaj ekzamenitoj en la mondo.

(Diversaj fontoj, i.a.: www.liberafolio.org/2011/unua-esperanta-kinofestivalo-ravis-spektantojn-sed-rezultis-en-suldo)

Nova estraro de TEJO

Dum la Internacia Junulara Kongreso en Kievo la komitato elektis novan estraron de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO): Łukasz Żebrowski (prezidanto), Paulína

Kožuchová (ĝenerala sekretario), Alisa Nikitina (kasisto), Sergeo Tyrrin (informado), Nico Huurman (aktivula trejnado), Petra Smidéliusz (landa agado), Michael Boris Mandirola (eksteraj rilatoj) kaj Tina Tišljar (kongresoj).

(www.tejo.org/eo/node/1228)

Sloganoj por la 125-jara jubileo de Esperanto nun ankaŭ esperantlingve

La retpaĝo por kolekti jubileajn sloganojn intertempe ekzistas ne nur en la germana, sed ankaŭ en Esperanto: <http://tricider.com/t/decide/en?show=2poU>. Oni povas facile kaj sen registriĝo voĉdoni pri la sloganoj kaj aldoni proprajn proponojn aŭ argumentojn.

(TEJO-aktuale)

Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Olomouc

En julio antaŭ la Universala Kongreso okazis la 77a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Ĉeĥio, kun entute 56 partoprenantoj el 12 landoj (Ĉeĥio, Bulgario, Finnlando, Italio, Germanio, Hungario, Kroatio, Pollando, Serbio, Aŭstrio, Rusio kaj Japanio). La ĉeftemo estis „Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj“. Detala raporto estas legebla sur la retejo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio www.esperanto.cz/eo/akce/kongreso-de-libe-blinduloj-367.html.

Meksikanoj ekelsendas televidprogramon en Esperanto

La Esperanto-movado de Meksikio estigis televidprogramon parolatan en Esperanto. Ties nomo estas Me-Info, mallongigo de Meksika Esperanto-Info. Redaktas kaj prezentas la programon lernantoj de

Esperanto-kursoj de la urbo Aguas Calientes. La elsendo okazas per interreto, ĉiuvendrede, je la 2:00 (UTC), ĉe la adreso www.telecentral.com.mx/casts/meinformo/programas.html

Nova adresaro de Pasporta Servo aperis

La ĉi-jara adresaro de PS enhavas 1087 gastigantojn en 672 urboj en 90 landoj. Ĝi estis redaktita de Alexandre Baudry kaj unufoje prezentita dum la IJK en Kievo kaj la UK en Kopenhago. En 2009, PS fariĝis ankaŭ socia retejo, kie kaj gastoj kaj gastigantoj povas membriĝi kaj kontakti unu la alian. Ĝi ne anstataŭas la presitan libron sed prezentas aldonajn servojn, haveblajn nur per interreto kaj havas 2000 uzantojn. La adresaro estas aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA. (Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Vikipedio en Esperanto atingis 150 milojn da artikoloj

Vikipedio en Esperanto atingis en aŭgusto la kvanton de 150.000 artikoloj. Per tio ĝi superas ĉiujn nombrojn de Vikipedioj en aliaj planlingvoj kaj ankaŭ kelkajn en naciaj lingvoj kiel la novhebrea kaj la greka.

(http://eo.wikinews.org/wiki/La_Vikipedio_atingis_150_milojn_da_artikoloj)

Somera Esperanto-studado (SES) en Nitra

191 personoj el 28 landoj renkontiĝis en Nitra, okcidenta Slovakio, por la 5-a SES. Tiun aranĝon tradicie organizas Slovaka organizaĵo E@I, kiu ankaŭ prizorgas la plej grandan portalon por senpaga lernado de Esperanto. Raporton vi trovas en la parto „kune“ de tiu ĉi numero de *Esperanto aktuell*.

Kolektis kaj prilaboris
Uwe Stecher